

La SAGO

La Sat-Amikara GazetO

*Espéranto :
vers une culture sociale sans frontières.*



De indigno al monda demokratio



La 15an de oktobro, unuiĝinte en nia diverseco por tutmonda ŝanĝo, ni postulas mondan demokration : monda registaro de la popolo kaj por la popolo. Inspirite de niaj gefratoj el Tunizio, Egiptio, Libio, Sirio, Barejno, Palestino-Israelo, Hispanio, Ĉilio, Grekio, ni postulas ankaŭ reĝimŝanĝon : ŝanĝon de monda reĝimo. Laŭ la vortoj de Vandana Shiva, la inda aktivulino, ni postulas la anstataŭigon de G8 per tiu de la tuta homaro : la G-7-miliardoj.

La Internaciaj Institucioj ne demokrataj estas nia monda Mubarak, nia monda Assad, nia internacia Kadhafi. Ili inkluzivas: IMF, MOK, la mondajn merkatojn, la plurlandajn bankojn, la G8/G20, la Eŭropan Centran Bankon kaj la Sekurkonsilion de UN. Ni ne permesos, ke kiel Mubarak kaj Assad

ili regos nian vivon sen nia konsento. Ĉiuj, ni naskiĝis egalaj, mizerulo aŭ riĉulo, virino aŭ viro ; ĉiu Afrikano aŭ Aziano egalas ĉiun Eŭropanon aŭ Amerikanon. Niaj institucioj devas reprezenti tion aŭ esti renversitaj.

Nun pli ol iam ajn la mondaj fortoj determinas niajn vivojn. Niaj dungoj, nia sano, nia loĝo, nia edukado kaj niaj pensioj estas kontrolataj de la internaciaj bankoj, de la merkato, de la fiskaj paradizoj, de la korporacioj kaj de la financaj krizoj. Nia medio estas detruita de la poluado en la aliaj kontinentoj. La militoj kaj la komerco de armiloj, de narkotaĵoj kaj de naturaj riĉfontoj, kies profitantoj estas malproksime de niaj landlimoj, determinas nian sekurecon. Ni perdas la regon de niaj vivoj. Tio devas ĉesi. La Civitanoj de la

Mondo devas trovi la regon de la decidoj, kiuj tuŝas ilin je ĉiuj niveloj - de la monda ĝis la loka. Tio estas la monda demokratio. Tion ni postulas nun.

Kiel la meksikaj zapatistoj, ni diras nun : «Sufiĉas ! Tie ĉi la popolo diktas kaj la registaro obeas. **Sufiĉas ! Tie ĉi la popolo diktas kaj la mondaj institucioj obeu.**» Kiel la hispanaj indignuloj, ni diras : «**reala demokratio nun ! - reala monda demokratio nun !**»

Hodiaŭ ni lanĉas alvokon al la Civitanoj de la Mondo : tutmondigu la placon Tahrir ! Tutmondigu *la Puerto del Sol* !

Laŭ komuniko sendita de CADTM
<http://www.recim.org/amip/nun-eo.htm>

(daŭrigo p. 14-15)

Legindaj Legendoj

Edukado de Hanumano.

«Leginda Legendo» invitas vin legi legendojn el ĉiuj kontinentoj akompanatajn de lingvaj klarigoj.

Kvankam ĉefe destinita al komencantoj, «Leginda Legendo» povas interesi ĉiujn legantojn!

Infano, Hanumano kredis la sunon matura mango kaj postkuris ĝin por ĝin manĝi. Pli aĝa, li eksciis, ke *Surjan*, la dion de la suno, ĉiuj agnoskas, kiel ĉiopovan kaj ĉioscian. Li povus esti la plej bona instruisto por knabo preparanta dian destinon. Hanumano volis peti de la dio plej bonan instruadon, konvenan por sia venonta rolo en la vivo. Li do levis sian korpon en orbiton ĉirkaŭ la suno kaj petegis, por ke Surja akceptu lin, kiel lernanton. Surja rifuzis ĉar li devas ĉiam movi la sunan ĉaron kaj tro okupata, li ne povus instrui pro manko da libera

tempo. Hanumano elreviĝis sed ne senkuraĝiĝis. Li persistis, multe pligrandigis sian korpon, metis unu piedon sur la orientan randon de la horizonto kaj la alian sur la okcidentan randon. Tiam, rigardante al la suno, li ripetis sian peton. Kontenta pro tiom da persistemo¹, Surja konsentis. Hanumano de tiam konstante moviĝis malantaŭen por restadi fronte al la instruisto dum Surja puŝis la sunan ĉaron antaŭen. Hanumano tiel lernis ĉion, kion bone edukita juna dio devas scii. Kiam Hanumano demandis Surjan pri la prezo de la instruado, Surja rifuzis, asertante, ke la plezuro instrui bonan kaj persistan junulon kompensas la prezon.

La fakto, ke Hanumano studis kun la majstro Surja, estas ĉiama

avantaĝo en lia kariertabelo².

La juna Hanumano ankaŭ estis ludema kaj petola knabo. Li foje incitetis la meditantajn saĝulojn kaj malordigis iliajn devotaĵojn³. Ili trovis tiun malbonan konduton netolerebla⁴ sed konsciante, ke Hanumano estas ankoraŭ nur infano, ili metis sur lin malgravan sorton pro kiu, li ne plu kapablos rememori siajn diajn povojn, krom se alia persono memorigas unu al li. Oni povas imagi, ke sen tiu sorto, la tuta fluado kaj rezulto de la milito Ramajano⁵ certe estus tute malsama ĉar, li montris fenomenajn kapablojn en tiu milito.

Pli malfrue, en la kvina libro de Ramajano, la Vanarao⁶ Jambavanto recitas al Hanumano, tiujn liniojn por aktivigi kaj uzi liajn kaŝitajn povojn.

Vi estas tiel potenca, kiel la vento.

Vi estas famkonata kaj inventema.

Neio en la mondo estas al vi tro malfacila.

Ĉiam kiam necese, tiu vi estas, kiu povas helpi.

Klod

Notoj:

- 1 Persistemo = kvalito de tiu, kiu persistas.
- 2 Kariertabelo = tabelo en kiu detale troviĝas la diplomoj kaj spertoj de kandidato al posteno.
- 3 Devotaĵo = objektoj por iu kulto : bildoj, rozario, ktp...
- 4 Netolerebla = kiun, oni ne povas toleri.
- 5 Ramajano = Granda india epopeo pri la militoj de Ramo kontraŭ la demonoj.
- 6 Vanarao = popolo de simiaj homoidoj (kvazaŭaj homoj), kiuj luktis en tiu epopeo kontraŭ la demonoj.

E-kuiru !

Vegetaĵa tortiljo



Por tri personoj:

5 terpomoj
0,5 L da akvo
175 g da kikerfa faruno
1 cepo
salo, pipro
8 kuleretoj da olivoleo

Kuiru la terpomojn en akvo; senŝeligu kaj tranĉu ilin.

Preparu la cepon. Kuiru ĝin en pato en oleo.

Aldonu la terpomojn, pipron kaj salon, kuiru

je meza varmo dum proksimume 5 minutoj ĉiam miksante.

Kirlu farunon kaj akvon; kaj aldonu la varman miksaĵon cepo-terpomo en la salatujon kaj miksu.

Verŝu la tuton en la paton kaj lasu je malalta varmo, miksante de ekstera parto al interna tiel ke la flano estu dika je 4 cm.

Bonan apetiton!

Flora Markov



Ĵus aperis :

1 La KD-albumo «Duope» de la famkonata bando Kajto

2 La KD-albumo Amindaj el Kubo (recenzota en LS80)

Daŭre eblas ankaŭ partopreni la subtenkampanjon al Vinilkosmo farante mendan subtenon de savitaj diskoj el la fajrego.

La listo de la savitaj diskoj konsulteblas ĉi tie <http://www.ipernity.com/blog/39007/349653>

Ni dankegas pro la reagoj kaj subtenoj kiujn ni ricevis ĝis nun ...

Esperanto-muzik-kulturo povas vivi nur dank' al vi!

Flo !

Mendebaj

1: <http://www.vinilkosmo.com/?disc=vkkd108&lng=e>

2: <http://www.vinilkosmo.com/?disc=vkkd109&lng=e>

Elŝuteblaj

1: http://www.vinilkosmo-mp3.com/duope-c-76_115_192.html?language=eo

2: http://www.vinilkosmo-mp3.com/amindaj-c-76_191_193.html?language=eo

Por mutualigi la rimedojn kaj pliefikigi nian agadon, kunfandu ni la diversajn SAT-movadajn revuojn



La SAT-movado – same kiel la neŭtrala movado – travivas momenton, kiam ĝia membro-nombro malkreskas. Malgraŭ tiu membrara malkresko, ni povas konstati renoviĝantan vigecon en SAT – *Sennaciulo* de kelkaj jaroj multe evoluis kaj la kunlaboro ĉirkaŭ ĝi ebligas daŭran riĉigon de ĝia enhavo. En la LEA-oj, la situacioj estas ege kontrastaj: iuj spertas viglan vivon kaj sukcesas eldoni enhavriĉan revuon, aliaj sukcesas bonteni retejon sed ne kapablas produkti pliajn varbilojn kaj informilojn, kaj ankaŭ estas kelkaj kiuj ne plu vere videblas, kvankam membrojn ili ankoraŭ havas. Ne forgesante lingvo-regionojn, kie tute malestas (eĉ embri-forme) LEA kaj kie tamen estas aktivaj SAT-anoj.

Antaŭ la konstato, ke la redaktaj skipoj de la diversaj SAT-movadaj revuoj frontas similajn problemojn – skipoj relative ne sufiĉe nombraj, manko de vic-empaŝigantoj, ktp – la esplorata de ni demando estas kiel organiziĝi por ke la revu-eldona agado de la SAT-movado estu kiel eble plej efika kaj riĉa.

1. Ĝenerala Konstato

La SAT-movado spertas nuntempe malkreskon de sia membraro, pro diversaj kialoj. Ni ĉi tie ne celas esplori la diversajn kialojn. Restas ke saman konstaton ni povas fari pri la tuta asocie organizita Esperanto-movado, sen paroli pri alitipaj movadoj.

Inter la efikoj, kiujn havas la membrara malkresko en la SAT-movado, estas reduktiĝo de la aktivula grupo. Efektive, en ĉiu asocio, nur parto de la membraro aktive partoprenas la vivon de la asocio, tio fontas el diversaj kialoj, inter kiuj ni elstarigas la sekvajn: persona manko de tempo (i.a. pro aliaj sociaj engaĝiĝoj), nesufiĉa memfido pri tio, kion la persono povas alporti al la asocio, nedeziro aktivi en la asocio, nesufiĉa informiteco pri la asociaj agadoj kaj eblecoj partopreni, nesufiĉa informiteco pri la eblecoj disvolvi novajn agado-terenojn, manko de personaj interrilatoj kun aliaj aktivaj membroj de la asocio, ktp. La aktivula grupo proporcie al la tuta membraro reduktiĝas, sekve malpli da agadoj povas esti prizorgataj. Tio povas esti kompensata ĝis iu grado per uzo de pli efika ilaro (interreto ludas nun gravan rolon en plimulto el la agadoj, ebligas eldonon de libroj kaj revuoj en rekorda tempo, starigon de tute novaj projektoj, kiel la esperantista ret-radio Muzaiko). Aliflanke, tiu membrar-reduktiĝo ne signifas malplian kvaliton de la agado. Ni eĉ povas konstati, ke fojfoje tia membrar-reduktiĝo devigas la membrojn bone pripensi organiziĝon kaj kvaliton de la laboro konsidere al la celita rezulto, por ŝpari energion, tempon kaj monon. Tia membrar-reduktiĝo ĉi tiel povas esti nur ŝtupo al denova disvolviĝo de la asocio, danke al la efika agado de la restanta

Enhavo

SAT-Amikaro - SAT Kunfandu ni ...	3/6
SAT-Amikaro Reskribi la statuton ? Letero de la kasisto	4 6
Analizoj/opinioj Pri komunikado, instruado, lernado Best-rajtoj kaj protid-fontoj Esperanto kun Linukso	6 10 11
Lingvo Legindaj legendoj Kiel traduki : Mouvement	2 7/8
Libro-servo	8/9
Recenzoj Libro vivas pli longe ol unu sezono	9
Humuraĵoj-diversaĵoj E-kuiru. HuMorelaj Linioj Selle-humuraĵoj Videofilmeto "La unua puto" BD: Ĉe la lago	2 10 11,12 16 16
Plu moviĝas la Movado - Le Mouvement en mouvement Indignu ! dise ĉie La tombo de Grosjean-Maupin Al kio utilas Esperanto ? Pariza regiono, Nantes	1,14/15 12 13 15

membraro. Membrar-reduktiĝo per si mem ne nepre signifas morton de la asocio: anstataŭ disperdigi la fortojn en konfliktoj interpersonaj, ĝi povas signifi koncentriĝon de la fortoj al pli cel-trafa agado.

Situacio en SAT

Kion ni observas el la nuna SAT-movado, tio montras diversajn ŝtupojn de simila evoluo al membrar-reduktiĝo. La membroj de SAT, post tempo kiam ĝia organo estis sufiĉe magra forme kaj enhave, sukcesis koncentri siajn fortojn kaj organiziĝi por restarigi veran



LA SAGO. CPPAP n° 0312 G 86224.

ISSN: 1763-1319.

Directeur de la Publication : Guy Cavalier.

Impr. TROISA, 91480 Quincy-sous-Sénart.

Dépot légal à parution.

Ĉefredaktanto : Vito Markovo. **Enpaŝiganto** : Serĝo Sir'. **Redakt- kaj korekt-skipo** : Andreo Andrio, Ĵak LePuil, Vito Markovo, Serĝo Sir', **kun helpo de** : Francua' Dekurcelo, Janine kaj Yannick Dumoulin, Véronique Girard, Phil Guichet, Jorgos.

Partoprenis en ĉi numero : Andreo Andrio, Robin Beto, Ralph Dumain, Lucette Échappé, GiMo, Pierre Grollemund, Mireille Grosjean, Kani, Klod, Lorenzo, Ĵak Le Puil, Flora Markov, Vito Markovo, Rafaelo Mateos, Lin' Morel, Arlette Plutniak, Raúl, Alain Runel, Jean Selle, Serĝo Sir', Ŝtonĉjo, la dinana grupo.

Kontribuaĵoj Contributions

Ĉiam bonvenaj ! Sendu ilin al la redakta korespondanto:

Toujours bienvenues ! A faire parvenir au correspondant de rédaction:

Serge Sire (Serĝo Sir')

85 impasse des Fées 74330 Sillingy

Reto : lasago@free.fr

■ Prefere per reto, **tekstoj** en RTF- aŭ TXT-formo por ligitaj dosieroj, skribitaj prefere en Unikodo, **bildoj** en TIFF-, JPEG- aŭ GIF-formo.

■ Eventuale sur papero, tekstoj **prefere** tajpitaj, sen forstreko nek surkorekto (erarojn eventualajn, oni indiku marĝene) Ne tajpitaj kontribuaĵoj publikeblas nur se volontulas iu tajpanto.

■ Artikoloj ricevitaj post la 20a de iu monato ne povas esperi aperigon en la numero de la sekvonta monato.

■ *de préférence par internet, textes en format RTF ou TXT pour un document joint, et images en format TIFF, JPEG ou GIF.*

■ *éventuellement sur papier par poste, les textes devant impérativement être typographiés (machine ou imprimante) sans ratures ni surcharges pour un traitement au scanner (erreurs éventuelles notées en marge) Les articles manuscrits ne peuvent être publiés que si nous disposons de dactylos bénévoles.*

■ *Les articles reçus après le 20 du mois ne peuvent pas espérer être publiés dans le numéro du mois suivant.*

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Represo de artikoloj permesata kun indiko de la fonto

La unua puto

Frاندinda fabeleto, kun pedagogia celo (lernu Esperanton per subtekstoj) bele eldirita kun frاندinda angla akĉento... <http://www.esperanto-sat.info/article1967.html>

Frاندaĵo!



En iu reĝlando, pro tro vama sezono, lago tute sekigis. Plendis la popolo pro soif-sufero. La reĝo komisiis



soldatojn iri serĉi akvon. Ĉiuj fiaskis, krom iu, kiu trovis glaciaĵojn el tre malvarma fora lando. Li forprenis



peceton, kiu fande reduktiĝis al peceto dum la hejmen-reveno.

Ĉar oni kredis la nekonatan glaciaĵon akvosemo, oni ĝin plantis.

El tiu ago naskiĝis la unua puto. Kiel? Nu! Rigardu la filmon!

La Tribuloj 4

Resumo de l' tria epizodo

Taŭga edzino estu ino ne rimarkebla!

Kaj kiel oni trovas ŝin, se ne eblas ŝin rimarki?

Ĝuste al tio utilas la patrinoj!

Jen! Vidu tiun ĉi ekzemple! Perfekta edzin-modelo!

Sed... Ŝi apenaŭ inas! Ŝi vekas neniun seks-deziron!

Bone tiel vi ne riskos kokritiĝi!

Cetere edzinon vi havu ne por sekso

sed ja por ke ŝi lavu vian pantalonon kaj kuiru vian supon kaj tiun de viaj infanoj...

Por havi infanojn, ino sekse allogu, eĉ se minimume, ĉu ne?

Filo mia, edzinon oni respektu, gravedigante ŝin en obskuro.

...kiel instruis al mi mia patrino, kaj kiel mi faris kun via patro kaj vi!

Kaj kiel gravedigi malallogantinojn?

Kaj en obskuro, vi imagos facile al kio utilas la allogantinoj.

Kaj al kio utilas allogo ĉe inoj kiujn oni nepre ne gravedigu?

Strangas niaj sociaj moroj...